pdf. **iompostiom** .net 015

internacia reta printebla gazeteto - pri kaj por ĉiuj Esperantistoj kiuj iom post iom efikas por bono

Redakcie

Fine denove!

Saluton karaj legantoj,

Estas longe antaŭe ke mi lastafoje aperigis numeron de ĉi tiu stranga malgranda gazeteto. Sed nun mi trovis denove kialon eldoni ĝin. Nome, mi uzu ĉi tiun vojon por sciigi vin pri la plej diversaj interesaj interretaj projektoj kiuj okazas!

Mi ekzemple tre ŝatus informi vin pri la plej novaj aferoj el la mondo de ĉio aktiv(eg)a en la interreto. Sed kompreneble plej gravas ne mi sed vi! Do ĉu vi volas informi la mondon pri viaj progresoj en la Esperanta mondo? Sciigu al mi kaj *iom post iom* ni ĉiuj vivos en pli esperanta mondo!

Joop Kiefte // LaPingvino

Poŝperanto

Kio estas Poŝperanto?

http://vikio.ikso.net/Projektoj/Posxperanto

La projekto Poŝperanto estas tuto da diversaj partoj por kune fari bonajn Esperanto-kursojn por la cifereca medio. Do ne nur komputiloj sed ankaŭ poŝtelefonoj.

Tio okazas pere de XML-formato kiu estas iom post iom difinata kaj pripensata, kaj poste per tio aliaj povos konstrui belegajn programojn por instrui Esperanton.

Ĉio tio okazas tute libere, do ĉiuj rajtas vidi ĉiujn kodojn de la projekto kaj uzi ilin por propraj. La normo estos libera, do uzebla de ĉiuj por ĉio ajn pensebla. Kaj la kursoj estos ĉi tiel ne nur tradukeblaj, sed ankaŭ por ĉiu lingvo tiel adapteblaj ke oni povas pli ekzercigi malfacilaĵojn kiuj ne aperas alilingve.

Bilde

Libera Programaro

Joomla en Esperanto

http://liberaprogramaro.org/

- Cindy McKee mencias ke fine oficiale Joomla enhavos ne nur Esperantan tradukon sed ankaŭ Esperantan instalilon. Korajn gratulojn por ĉio!
- Vi povas kunlabori kun la Joomla 1.5 tradukado: La SVN-deponejo enhavas la dosierojn kiujn ni tradukas, kaj ankaŭ La Projekta Paĝo. En la Joomla labor-terminaro, ni bezonas helpon pri la decido de terminoj markitaj per demandosigno.